

V- 19119/15

(1953)

ISAE

OOMOTO**MONATA ORGANO DE OOMOTO**

15-a Jaro N-ro (159-162) Administracio: Kameoka, Kioto-hu, Japanujo
 Abonprezo: ¥ 360 por unu jaro; \$ 1.20 aŭ 18 Steloj por eksterlando: Abonebla
 ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Rieuwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

La Universo kaj la Elektrismo

(El la "Rakontoj el la Spirita Mondo")

En la Universo estas misteraj atomoj. Unuj nomiĝas *Ka-so* 火素 (fajraj elementoj) aŭ simple spiritaĵoj, kiuj estas enhavataj en ĉio kaj ankaŭ plenigas la tutan atmosferon. Aliaj nomiĝas *Tai-so* 体素 (korpaj elementoj) aŭ *Sui-so* 水素 (akvaj elementoj). El la kombino de la suprediritaj du-specaj elementoj naskiĝas la "vivenergio". El tiu ĉi vivenergio estiĝas la elektro en la universo. Ĝi estas la vivforto de ĉio en la universo.

La "spiritaĵoj" estas nomataj en la japana teologio *Takami Musubi* kaj la "akvaj elementoj" *Kammi Musubi*. Kiel dirite, el tiuj ĉi du-specaj elementoj kreiĝis la elektro, kaj la ok bazaj fortoj de la naturo: movo, stabilo, kohero, malstreĉo, centrifugo, centripeto, kuniĝo kaj disiĝo. Tiuj ĉi fortoj ebligis la formiĝon de la Granda Universo.

La modernaj homoj ŝajnas esti fieraj pri la materia civilizo, kiu evoluadas tagon post tago. Ili kredas, ke ilia scienco povas klarigi ĉiujn enigmojn de la tuta Universo. Tamen ilia scienco ankoraŭ ne atingis eĉ ĝis la sojlo de la Dia Mondo.

Hodiaŭ, la aplikado de la elektro, naskiĝinta el la du-specaj elementoj, fajra kaj akva, faris iom da progreso. Tio estas ĝojinda, ĉar tio signifas unu paŝon antaŭen al la fondiĝo de l' Dia Regno sur la Tero.

(Diktita la 3-an de Jan., 1922)

WK/102/1/42

Hidemaru Deguči

Memornoto

Kiu faras multe da paŝoj, al tiu ne mankas mispaŝoj. Ju pli li paŝas, des pli konsumiĝas liaj ŝuplandoj. Lin lacigas kaj enuigas foje la penso pri malfaciloj de l' longa vojo. Malgraŭ ĉio tamen li progresas kaj progresas, ĉar li strebas antaŭen.

Kiu faris multajn mispaŝojn, tiu pli kaj pli lernas ne fari tiom multajn estonte. Kiu ne volas, tiu eĉ vidi ne povas. Kiu ne kaptas permane, tiu ne povas enmanigi al si. La malmolecon de io konas nur tiu, kiu akcidente ekbatis sian kapon kontraŭ ĝi. Pri ĉio ajn, kio estas en la mondo — sperto estas averto la blej bona. Sen peno estas neniam kompreno. Sen memsperta kapjeso ne estas progreso de l' homa spirito.

Faru ĉion ajn, kion vi volas — senhezite kaj senĝene — ĝis vi vidos per vi mem, kapjesante por vi mem. Sed por tio kondiĉas, ke vi havu sufiĉe da kuraĝo. Sen ĝi, vi estos facile kaptita de la kontraŭeco, ke vi “volas iri, sed timas iri,” kaj depremiĝos mezfare.

Komprenu senfie, farante senfine, introspektante senfine.

Kiam vi eraris, estu honesta rekoni ke vi eraris. Sufiĉas, se vi estos gardema por ne ripeti la saman eraron. Kiom ajn multe vi ĉagreniĝos pro via eraro, ne revenos kio pasis. Forgesu do la pasintecon en ĉiu momento. Enterigu ĝin ĉiumomente kaj ĉiufoje vi renaskiĝu. Kaj post ĉiu renaskiĝo vi estu pli granda kaj pli saĝa, ol vi pasinta.

Al ĉiu ne mankas malbonaj inklinoj, kiuj estas malfacile korekteblaj. Sed se introspektante vi strebas nuligi la malbonajn kaj alproprigi al vi la bonajn, ĉio bone iros por vi. Tamen se vi neglektas introspekti kaj priatenti, viaj malbonaj inklinoj por ĉiam

restos nekorektitaj; sekve, via memo neniam estos “rekonstruita.”

Nur iom da atentoj faras bonajn inklinojn.

Esence, la homa temperamento konsistas en la faldoj de l' kutimo, amasigitaj en la homa spirito dum longa tempo ekde la komenco de l' Universo. Ĝi do tute ne estas fiksita por ĉiam kaj neŝanĝebla. Pri la vereco de tiu ĉi aserto vi facile vidos se vi observos la konstantan ŝanĝiĝemon en la interno de via memo. El tio sekvas, ke la homo dank' al sia strebado povas evolui kaj progresi senlime.

Kian via koro reflektas, nur tia la mondo al vi aspektas.

Dio estas senlima kaj eterna. La homo *estu* senlima kaj eterna.

La deziro superi aliajn estas abomena kiel “io sangavidanta.” De ĝi venas ĉiaj sentoj de ĵaluzo kaj envio. Ĝi tamen plej forte regas la koron de l' modernaj homoj. Se ĉiu homo ne lernas agi pro motivo ne konkura, sed pure plezura, ĉio ne iras bone.

Plej abomeninda en la koro de l' homo estas egoista superregemo, kiu ekskluzivas aliajn. Se oni trovas la mondon malfacila, malagrabla kaj malbona, estas bone memori, ke oni vidas en ĝi la respegulon de tiu ĉi superregemo de la koro. Sentrude kaj senĝene — ĉiu estu en sia propra ĝusta loko.

Estu vere honesta kaj fidela al via interna memo. Kiom ajn fiere oni pretendas, ne-heroo ne povas fari el si heroon, kaj ne-filozofa ne povas fari el si filozofon.

Li estas li kaj ne estas mi. Mi estas mi kaj ne estas li. Ĉiu faru kion li povas — laŭ sia naturo kaj *en plezuro*.

Kiu faras kontraŭ persona naturo faras al si aflikton. Dio aranĝis pri la homoj — kiel la *moveblaj membroj* de Dio — ke ĉiu el ili agante laŭ persona gusto kaj intereso povu plenumi sian

mision por la tuto.

Malgraŭ tio, la plimulto de la modernaj homoj, idolanoj de la racio, okupas sin en aferoj por si sengustaj kaj seninteresaj nur tial, ke tio estas por vivakiro kaj gloravido. Ilia ĉiutaga interna vivo estas en sufero kaj aflikto. Sekvu do personan naturon kiom eble plej okupante vin en afero, kiu estas por vi nur gustoplena. Ne ĝenu vin pensante, ĉu tio ne ŝajnas al aliaj stulta aŭ freneza, kion vi faras. Se vi zorgadas pri tia afero, eĉ la tuta vivo ne sufiĉas por vi ekkoni, por kio vi ja venis en la mondon.

Via sento ŝanĝiĝas laŭ tio, ke la (vin influanta) spirito ŝanĝiĝas.

Introspektu: se la spirito vin influanta ŝajnas ial malbona, strebu ĝin subigi, kaj se ŝajnas, ke vi estas sub pli-malpli bona influo, agu senhezite kiel via natura sento deziras.

Tamen, memoru, ke nia fina idealo estas atingi la altan animstaton de la "homo unuiginta kun Dio". Tial almenaŭ ĝis kiam iu atingas tian animstaton, li bezonas ege introspekti. Sed unu fojon kiam li atingis tian staton — en kiu li plu absolute havas nenion komunan kun malbonaj spiritoj — li plenumas entute la Volon de Dio eĉ kiam li dormas. Tiu ĉi idealo praktike ne estas neatingebla. Ĝin ĉiu ajn povas atingi dank' al la kredo en Dio kaj la konstanta memdisciplinado laŭcela.

Por kio tio utilas, eĉ se vi afliktiĝas malpacience, ke iu alia ne agas kiel vi? Pli bone estu toleremaj unu la alian, donante reciproke nur eblajn konsilojn kaj helpojn, por ke ĉiu el vi pli bone progresu laŭ sia naturo. Por ĉiu afero en la mondo estas la spirito ĝuste taŭga, sen kiu ĝi ne sukcesas.

Tute laŭ-nature la fajro flamas vertikale kaj la akvo fluas horizontale. La akvo, kiam ĝi venas al la ĝusta loko, fariĝas aŭ "akvofalo", aŭ "maro".


Same, spite ĉiujn batojn vi iam fariĝos la homo merita, nur se estas io vere merita en via naturo.

Scienca kaj Religio

Atomfiziko kaj Heredscienco*

Pri la Heredscienco de Schrödinger

Reizo Takasu



I ENKONDUKO

La disvolvigo de atomfiziko pli kaj pli malfermas la pordon al la nova mondo, kiu ĝis nun restis tute mistika por la pozitiva scienco, t. e., pli kaj pli solvas la diversajn enigmojn, kiujn oni dum longa tempo rigardis nur "metafizikaj" aŭ "ideaj".

La moderna atomfiziko klarigis, ke la materia substanco estas la kombinaĵo de atomoj, kiuj mem konsistas el la elementaj partikloj. La vorto "atomo" estas derivita de la greka "atom", kiu signifas "nedivideblaĵo" kaj kiu estas la minimuma unuo de la materio.

La ideo pri korpusklo originas de Demokritos, greka filozofo antaŭ la kristana erao kaj estis pli malpli konceptita ankaŭ de unu skolo de hinda filozofio. Sed, kiu tiel science sistemigis la ideon pri atomo, kiel ni vidas hodiaŭ, estas George Dalton, angla fizikisto en la komenco de la 19-a jarcento. Laŭ lia teorio, ĉiu el la elementoj konsistas el mikreroj, t. e. atomoj, kiuj havas sian propran econ kaj mason, kaj ĉiu kombinaĵo fariĝas el mikroj, kiujn formas la mikreroj unuigante laŭ difinita simpla proporcio.

Poste, Avogadro faris amendon al la supre citita teorio kiel jene: la materia substanco konsistas el molekuloj, ĉiu el kiuj siavice konsistas el unu aŭ kelkaj diferencaj atomoj kaj ĉiu molekulo estas dividebla en atomojn per kemia procedo. Al tiuj ĉi dividitaj atomoj oni ne plu povas apliki la "principon de konstanteco" konatan en la klasika dinamiko, ĉar ili nature diseriĝas per radioaktivo kaj transformiĝas en aliajn substancojn.

D-ro E. Schrödinger, atomfizikisto, aludas, ke ni faris longan

* Por ĝenerala intereso ni forigis ĉiujn tro malfacilajn terminojn kaj anstataŭigis ilin per familiaraj vortoj.
La Red.

vojon por la progreso de l' scienco ne nur laŭ ĝia amplekso sed ankaŭ laŭ ĝia profundo, sed ĝuste tiu fakto tamen kondukis nin al la kurioza memkontraŭeco: en la kadroj de tempo kaj spaco oni ne plu povas didaktiki fizike kaj kemie. Krome, li asertas, ke la atomfiziko fine sukcesis malkovri al ni la ekziston de la kvar-dimensia mondo, kaj dank' al tio la problemo pri la *vivo* de ĉiuj organismoj fariĝis pli facile klarigebla. Lastatempe li publikigis malgrandan tezon sub la titolo "Kio estas la vivo?". En ĝi li donas la atomfizikan klarigon al la problemo de heredscienco. Estas interese, ke li mencias en ĝi pri la problemo de niaj prapatraj spiritoj kaj pri ilia *karma*, pri kiuj la Oomoto-religio pritraktas tiel grave.

II STRUKTURO DE ATOMO

Nu, pri la strukturo de la atomo, d-ro N. Bohr, fama Kopenhaga sciencisto, starigis en 1913 sian teorion. La konturo de lia teorio estas jena:

En la atomo okazas la rondiro de unu aŭ kelkaj, aŭ pli multaj elektronoj kun alta rapideco sur difinita orbito ĉirkaŭ la atomnukleo (protono), tute same kiel la rotacio kaj rivoluo de la planedoj: Marso, Merkuro, Venuso, Jupitero, Sturno, Uranuso kaj Neptuno ktp. en la suna sistemo. El tio oni povas vidi, ke la alt-rapidega movado de la elementaj partikloj, kiaj protonoj, neŭtronoj kaj elektronoj, formas sian propran atomsistemon por konsistigi la atomon.

En la atomfiziko oni kutimas uzi kiel unuon de longeco Ångstrom (Å), kiu estas 10 mil-milionono de 1 metro (10^{-8} c. m.). La diametro de diversaj atomoj estas inter 1 Å kaj 2 Å.

En okazo de bakterio, ĝi estas videbla per 2-milobla mikroskopo, sed la atomo estas tiel eta, ke oni ne povas percepti ĝin per la nuntempaj optikaj instrumentoj. Por kia bezono la materia substanco konsistas el aro de tiel malgrandaj atomoj? Ĉar la materio bezonas esti konstruita en tia strikta ordo, ke en ĝi aro de atomoj plene respondu al la pensado (inkluzive sensojn); tio signifas, ke ĉio, kio okazas en ĝi, devas okazi kun la plej alta precizeco laŭ la fizika leĝo, kaj kun la plej alta precizeco ĝi devas ankaŭ respondi al la fizika ago de-ekstera. Por tio, la interno de l' substanco devas

konsisti el aro de kiel eble plej subtilaj eroj.

Kompreneble, ĉiuj individuaj atomoj daŭrigas sian arbitran kaj senordan varm-movadon, tamen se ni rigardas el la vidpunkto de statistika probableco, oni povas rimarki, ke la "unueco kaj ordo" regas super ili kiel tutaĵo, kiel la granda amaso de la granda nombro da atomoj. Vere, ĉi tie estas citindaj la vortoj de Majstro O. Deguĉi, "En la mondo sen la unueco neniam regos la stabileco," kaj "Kie estas la ordo, tie estas Dio. Sen la ordo, sen la Dia Vojo."

Alivorte, la unueco kaj ordo estas la fonto de la energio de la Kreanta Vivo. Ni observu la homan mondon sur la terglobo, kaj ni konstatas, ke ankaŭ tie funkcias la sama leĝo. Al la arbitra varm-movado de atomo korespondas la libera volo de individua homo, kaj al la granda aro da atomoj la socio. Estas do absolute necese, ke la homa socio ankaŭ devas konformiĝi kun la kosma vero. Denove, ni citu la vortojn de Majstro O. Deguĉi: "Libereco sen Di' ne estas la libereco por mi."

La Majstro, laŭ mia interpreto, instruas nin, ke la Vivo fontas tie, kie la atomoj (individoj) mem havante sian arbitran movadon (liberecon) estas, kiel tutaĵo, en la unueco kaj ordo (Vero = Dio). La fundamenta doktrino de la Oomoto-religio baziĝas sur la kosma vero; la unueco kaj harmonio, sen kiuj nenio vivo povas ekzisti, kaj sen la ĝusta kompreno pri ili nenio povas ĝuste kompreni la misteran mondon, kiun tiel majeste kreis Dio.

Kion mi skribis ĝis nun, tio estu sufiĉa por konjekti, kiel subtila sistema strukturo, kiun konsistigas grandnombro da atomoj, estas necesa por ĉiu vivaĵo kaj ĉiu estaĵo, kiu plenumas biologiajn fenomenojn. Ili ĉiuj devas esti metataj sub la kontrolado de la kosma unueco kaj ordo por plenumi en granda harmonio la ekzaktajn biologiajn leĝojn kaj neniu "hazarda" okazantaĵo de "unuopa atomo" estas permesata disrompi la harmonion de la tuto.

III PRI HEREDSCIENCO

La homa korpo konsistas el pli ol 2 mil-milionoj da ĉeloj. Ĉiu ĉelo faras la tiel nomatan ĉel-dividon por formi multĉelan embrion. En la ĉel-divido estas du manieroj: "duobla" kaj "duona" (mitosisa kaj redukta). Ĉiu ĉelo havas en sia nukleo la kromatinojn, kiuj ludas

la gravan rolon por heredo. Laŭ la speco de animalo malsamas la nombro de kromatinoj, enhavataj en ĉiu ĉel-nukleo. En la okazo de homo ĉiu ĉelo entenas 48 kromatinojn. Kiam unu ĉelo dividas sin en du ĉelojn, ĝi disdonas po 48 kromatinojn al ĉiu el la ĉelidoj (entute 96, t. e. *duobla*). Sed en la okazo de la genera ĉelo, kia estas tiu de ovulo aŭ spermatozoido, ĝi dividas sin en du ĉelidojn disdonante po 24 kromatinojn (t. e. *duona*). Ĉi tiu ĉelido kun 24 kromatinoj ekhavas 48 post koncipiĝo. Ĉi lasta divido "duona" havas tre gravan signifon por heredo.

Ĉiuj 48 kromatinoj estas individuaj unuoj, kaj reprezentas respektive 48 prapatrojn. Kaj estas mirinde, ke 48 prapatroj vivas ja en ĉiu el 2 mil-milionoj da ĉeloj, kiuj konsistigas nian korpon!

IV HEREDSCIENCO DE SCHRÖDINGER

Ĝis antaŭ ne longe la heredscienco pritraktis nur fizikajn faktorojn. Sed Schrödinger ekuzis la vortojn "kvar-dimensia heredo". Tiuj ĉi vortoj signifas, ke la heredo okazas ne nur fizike, sed ankaŭ spirite (inkluzive *karmon*). Alivorte, la spiritaĵoj de ĉiuj 48 prapatroj estas hereditaj. Parolante pri mi, kvankam ĉiuj 48 kromatinoj, aŭ miaj 48 prapatroj, en ĉiu el la ĉeloj estas individuaj estaĵoj, tamen en sia tuta unueco kaj ordo ili entute formas mian personon. Tial unu persono nomata "Mi" konsistas el 48 prapatraj spiritoj.

Mi jam skribis pri la "duona divido". Dank' al tiu ĉi divido mi ricevas 24 kromatinojn de la patra spermatozoido kaj 24 kromatinojn de la patrina ovulo, per kio okazas mia heredo de miaj gepatroj. Tiamaniere mi heredas la spiritaĵojn de la prapatroj laŭ la proporcio de 50-50 el ambaŭ familioj. Ĉe tio oni trovas la sciencan kialon, pro kiu Oomoto akcentas la gravan necescon de la servado al la prapatroj de ambaŭ familioj.

Ĉiu kromatino estas bastonforma kaj ĉe ambaŭ ekstretoj de kromatino troviĝas genoj. Ĉiu geno konsistas el ĉ. 1,000 atomoj. La nombro de atomoj en geno diferencas laŭ individuoj, sed la nombro de atomoj por iu persono neniam ŝanĝiĝas kaj estas fiksita por ĉiam heredigante.

Ekzemple, se la nombro de atomoj en la geno de mia kromatino

estas 1,010 kaj tiu de mia edzino 1,050, tiuj ĉi nombroj respektive transiras per heredo al miaj filoj kaj poste al miaj nepoj kaj tiel plu senŝanĝe por eterne. Tiamaniere, la nombro de atomoj en geno estas tute malsama laŭ personoj, sed la nombro de atomoj en geno de tiu aŭ alia persono estas por eterne fiksita.

Schrödinger klarigas, ke la rezulto de la ĝisnuna esploro dum jarcentoj pruvis la senŝanĝecon de la nombro. Sed rimarkinde estas, ke la ordo (aranĝmaniero) de la atomoj konstante ŝanĝiĝas pro diversaj faktoroj, kiaj estas la vivĉirkaŭaĵo kaj korstato. Se iu estas ŝtelema, la ordo de atomoj en liaj kromatinoj ŝanĝiĝas konforme al tia korteniĝo, kaj per reproduktado herediĝas al liaj idaroj tiel, ke establiĝas la familia linio de ŝtelemuloj. Tia influo ne estus tiel rimarkinda, se la nombro de atomoj estus infinite granda, sed ĉar ĝi estas ĉirkaŭ 1,000 atomoj (malgranda nombro), eĉ la plej subtila influo donas drastan efikon.

Tiu ĉi fakto avertas nin, ke ni devas vivi ĉiam kun senmakula konscienco por ke ni povu transdoni la purajn genojn al niaj idaroj. Majstro O. Deguĉi instruas nin, ke la homa korpo estas la kapelo de Dio, kaj en ĝi ni devas ĉiam teni nian animon pura.


V TENU ANIMON KONSTANTE PURA

Estas interese kaj timige, ke la ordo estas ŝanĝiĝebla laŭ niaj cirkonstancoj kaj korteniĝo. Kiamaniere ŝanĝi kaj, se eble, kiamaniere interrompi la heredan linion de nedezirindaj faktoroj?

La ordo de atomoj estas ŝanĝebla per lumo, varmo kaj elektromagnetaj ondoj (x radioj, α, β, γ radioj). El ili la elektromagnetaj ondoj havas la plej fortan efikon, kaj povas ŝanĝi la ordon kelkdekoble pli rapide ol la natura ŝanĝiĝo. Tiun karakterizaĵon oni jam aplikas al agrikulturo, ekzemple, por akiri plibonkvalitan specon de semoj.

Kiel oomotanoj ni kredas, ke ekzistas la "spiritaĵoj" de Dio, kiuj sendube estas multe pli subtilondaj ol tiuj de γ radioj. Tial dank' al la spiritaĵoj ni devas klopodi ŝanĝi la atomordon de niaj kromatinoj, por disrompi la kaŭzojn de nia malbona sorto kaj konstrui la belan karakteron tiel decan al la filo de Dio. Majstro O. Deguĉi instruas, ke ni devas kaj povas savi la spiritojn de niaj prapatroj en la ĉielregnon kaj ankaŭ konstrui la ĉielregnon sur la tero, pere de nia kredo en Dio, ĉar la kredo en Dio ŝanĝas ĉion bona, bela kaj vera.

Trad. M. Kuroda



KRESKANTECO DE L'

ĈIOMO* (1)

Ernest Dodge

Ordinare kiam oni parolas pri pasinta historio aŭ pri estonteco, lia penso estas nur pri limigita periodo. Ofte kelkaj jaroj aŭ kelkaj jarcentoj. Eble, se oni estas geologo, lia penso estas pri kelkaj jarmiliardoj. Sed kio okazas, se ni fariĝas filozofiismaj kaj kuraĝas meditati pri absoluta eterneco? Malfacila penso! Sed se ni restu raci havaj estuloj, ni ne povas eskapi ĝin. Kaj mi diru nun ke el kvar imageblaj hipotezoj pri ĝenerala formato de l' universo, nur unu aspektas — almenaŭ al mi — iel akceptebla.

Kiuj estas la kvar? La unua (kaj ĉe unua vido la plej simpla) estas la jeno. Oni povus bildigi la historion de l' universo kiel fadenon de okazaĵoj, preskaŭ senŝanĝa je dikeco, etendanta ĝis la nuno el eterna pasinteco kiu *neniam komenciĝis*, kaj etendonta post la nuno en est-

ontan eternecon kiu *neniam finiĝos*. Mi konsilas ne pensi tro multe laŭ tia maniero, ĉar eble ĝi frenezigus onin. Kaj ĉar mi ne kredas la universon frenez-aĵo, mi ne plu kredas la unuan hipotezon.

Jen la dua: oni povus similigi la eternan fluon de okazaĵoj al rado turniĝanta. Ĉio, kio nun okazas, estas jam okazinta iam en antaŭa tempo — ne unufoje, sed infinitan nombron da fojoj. Tio signifus, ke la tuta nombro da okazaĵoj ne estas infinita, sed mezurebla. Aŭ pli ĝuste dirite, nenio *vere* okazas; ĝi nur reaperas. Tia ideo forrabus de la universo ĝian plej karan posedaĵon — la posedon de *celo* por ekzisto.

Jen la tria: oni povus imagi ke la universo similas al sono de grandega sonorilo, nur unufoje frapita kaj neniam reŝrapota. La sono fariĝas pli kaj pli malforta kaj velka, ĝis fina estingo kaj

silento. Konfesende ja estas, ke en la moderna fizika scienco, la leĝo de dinamiko nomata "entropio" sugestas ke la nuntempa arego de astroj en astronomia spaco similas horloĝon unufoje streĉitan, kiu iam estonte, post malstreĉiĝo, ĉesos funkcii. Sed por pensadi pri eterna daŭro, tiu hipotezo estas neakceptinda. Enestas tro multe da pesimismo kaj malespero. Koncedu, ke la streĉita horloĝo malstreĉiĝos, sed iamaniere ĝi estos restreĉita — tion forte asertas la homa koro.

Do kia estas la kvara kaj fina hipotezo? Ni povu havi sufiĉan fidon por atribui al la universo la esencan kvaliton de *kreskanteco*. Kreskado eleterna kaj ĝiseterna.

Certe, la ideo de senkomenc-eco ne povas esti tute nuligita. Sed ĝi povas esti sufiĉe aliformita, ke ĝi ne alvokos al frenezo la pensanton. Imagu al vi, se vi povas, ke la tutaĵo de okazaĵoj kiu proksime antaŭis la nunon estis io malpli granda ol la

tutaĵo de la nuno. La eĉ pli frua stato antaŭ la ĵuse pasinta tempo estis tutaĵo eĉ malpli vasta. Kaj tiel plu — ju pli longe ni ĵetas nian imagon en la pasintecon. Tiel kiam ni provas pensi pri la teoria aŭ fiktiva tempo kiu estu *infinite* malproksima antaŭ la nuno, la tiaman ekzistantecon de l' universo oni povus pripensi kiel ion dinamike kaj mistere gravedan ja por estontaj eblecoj, sed en jama efektiveco ĝi aspektus kiel kvazaŭa nulo — se komparete kun nuna vasta stato de l' agoplana universo.

La supra penso pri la ĉiomo de ekzisto alvenis kiel ekbrilo de beno al tiu homo (nun verkanta ĉi tiun artikolon) kiu antaŭ kvardek jaroj sukcesis (dank' al Dia graco!) elpensi ian universan silogismon aŭ teoremon — en la speciala formo nomata "dilemo" — kiu ŝajnas doni versimilecon kaj kredindecon al la komforto-dona teorio supre skizita.

(finota)

Heroldo de Esperanto

Duonmonata internacia organo de la
Esperanto-movado en granda kaj bela formato

Eldonejo:

HEROLDO DE ESPERANTO

Harstenhoekweg 223. Scheveningen, Nederlando

* Ĉar tiu ĉi estas la filozofia traktato, mi preterlasis kelkajn novajn vortojn, kiujn la aŭtoro uzas, kiel necesajn terminojn.
La Red.

La 40-a Japana Esperanto-Kongreso

19-21 de Sept., en Okajama, Ekĝermejo
de Japana Esp-movado


La 40-a Kongreso de Japanaj esperantistoj okazis dum tri tagoj, 19-21 de sept ĉe la bioĥemia lekciejo de Medicina Fakultato de Okajama Universitato, Okajama, urbo en la okcidenta parto de Japanujo, kiu havas laŭ sia marborda linio multajn tipajn vidindaĵojn de Seto Enlanda Maro, nomata "Monda Parko de la Maroj". Por Japanaj esperantistoj la urbo estas rememorinda kiel la ekĝermejo de nia-landa Esp-movado. En 1905 la angla samideano, s-ro E. Gauntlett, semis la unuan semon de nia lingvo, kaj en 1923, ekzakte antaŭ 30 jaroj, la urbo havis la 11-an Japanan Esperanto-Kongreson.

LA UNUA TAGO — Je la 13a horo, la malferma horo, ĉ. du centoj da esperantistoj, kiuj kolektiĝis el diversaj partoj de la lando, plenigis preskaŭ tutan spacon de la Kongresejo. Momenton, kiam unu sinjorino, tre maljuna, sin apogante sur la ŝultro de kongres-oficisto eniris kaj sidiĝis ĉe la gast-sidejo, ekhaltis esperantlingvaj babiladoj, kiuj brue okazis ĉe diversaj lokoj de la ejo. Ŝi estis f-ino Kajiro, pri kiu ni skribos poste.

Baldaŭ oni solene deklamis la malfermon. Post la ĥoro "Espero", prof. Hideo Jagi, fakestro de akuŝologio kaj ginekologio de Okajama Univ. faris bonvenigan saluton kiel la prezidanto de la organiza komitato. Lian elokventecon

eble memoras la malnovaj samideanoj, kiuj aŭdis lin paroli kiel la vic-prezidanto de Universala Esperanto-Kongreso, Varsovio, 1937. Lia parolado estis sonregistrata per rubando, aranĝita de N. H. K. (Japano Brodkasta-Asocio). (Samtage vespere la loka stacio ĝin disaŭdigis.) Li iom detale tuŝis profundan rilaton de la urbo Okajama kun Japano Esp-movado, kaj poste prezentis 'al la ĉeest-antaro honorindajn gastojn de la urbo, kiuj volonte partoprenis por honorigi la Kongreson. Kaj laŭ la kongresa elekto li fariĝis la prezidanto de la Kongreso.

Post tio la gastoj sinsekve salutis. Unue, d-ro Miki, guberniestro de Okajama kaj honora prezidanto de la Kongreso mirigis nin salutante en bona esperanto. Due, f-ino Kajiro, estro de San-jo Virina Liceo, malfacile paŝis sur la estradon kaj petinte permeson por la uzo de nacilingvo, ŝi rakontis tre interesajn rememoraĵojn pri sia iama esp-ista sperto. Ŝi estas 84-jara kaj la unu-sola ĝisvivanto en Okajama, kiu ricevis la esp-an kurson de s-ro E. Gauntlett antaŭ ĉ. 50 jaroj. Kun la jam malforta korpo, ŝi tamen estis kempetenta paroli tre vigle kaj kateni la aŭskultantojn per fadeno de sinsekvaj humoraĵoj. Trie, s-ro T. Oka, provinca historiisto, regalis nin ĉiujn per abundo da interesaj epizodoj de l' esp-istoj en la unuaj tagoj de la japana esp-movado.



Kvare parolis s-ro A. C. Blatt, usona samideano, kiu jam estas intima "ĉiamulo" de tia festo.

Poste, la mesaĝo de s-ro Gauntlett prezentigis per disko, en kiun li volonte registris sian voĉon por honorigi la Kongreson. Li, jam tre maljuna, nun kuŝas malsana en Tokio. Liaj vortoj estis tre malfortaj, sed lia arda deziro por la sukcesigo de esp-movado kortuŝis ĉiujn partoprenantojn. Kredeble ĉiuj ĵuris en sia koro: "S-ro Gauntlett akceptu la dankon de ni, la japana esperantistaro! La semo, semita de vi, elkreskis kaj nun portas ĉarme belajn florojn!" Subite elektra motoro ekmuĝis tra la la emociplena atmosfero de la kongresejo kaj la fenestroj rapide ŝirmiĝis per metalkurtenoj. Kio okazis? La kongresejo estas la bioĥemia lekciejo aranĝita per modernaj ekipaĵoj. Sur la ekrano en la fronto sinsekve prezentigis per projekcia lanterno multaj salutleteroj, senditaj de l' samideanoj ne nur el eŭropo sed ankaŭ el Koreujo kaj Hongkongo en la nomo de asocioj aŭ personoj.

La projekcion akompanis la voĉlego antaŭe aranĝita de l' organizintoj. Apenaŭ la lasta prezento finiĝis, la ejo heliĝis denove kun la bruo.

Nun la vico de delegitoj, kiuj raportis pri lokaj movadoj.

Poste la kutima raporto pri la Donacoj de l' Ossaka-Premio kaj de l' Jonedo-Stipendio. S-ro Itta Oka, de biblioteko de Kansai Supera Duagrada Lernejo akiris la Ossaka-Premion pro sia esp-a kontribuo al la japana literaturo por geknaboj (ekz. enkondukanta dramojn "Sub la Verba Stelo" en la vol. 5 de "Kolekto de Japano Reprezentanta Geknaba Literaturo" kaj "Rakonto pri Esperanto" en la vol. 6 de "Plena Kolektode Klerigaj Dramoj por Lernejoj"). Kaj s-ro Cukasa Kobajaŝi, juna diplomito de Niigata Medicina Fakultato, ricevis la Jonedo-Stipendion por lia kompletigota nacilingva traduko de "Historio de la Lingvo Esperanto" de d-ro E. Privat. Speciale en tiu ĉi jaro, aparta stipendio de d-ro Jonedo donaciĝis al s-ro Ŝ. Mijake, de Japano Esp-Instituto, ĉar li



Parta vido de la Kongresejo

longe sin ĉediĉas al la penega redakcia laboro de "La Revuo Orienta." En granda aplaŭdado la prezidanto sinsekve transdonis la premiojn al tiuj tri elektitoj.

Je la 15.5 horo la iom formala parto de la kongresa programo finiĝis kaj venis la parto de amuzaj horoj. Kelkdekoj da membroj de Okajama Brodkasta Koruso kantis esperantajn kantojn. Kiam ili prezentis la "Kanton de la 40-a Kongreso," speciale verkitan de d-ro Jagi, ĉiuj partoprenantoj kunkantis laŭ la teksto antaŭe liverita. Sekvis la prezentado de l' projekcia filmo "Erinjo-Fingreto" farita de Okajama Eskulapida Klubo. Ankaŭ la dramo "Kappa", moderne adaptita el la verko de l' famekonata novelisto, Akutagaŭa, prezentiĝis de la samaj klubanoj. Ĝi estis tre interesa kaj alta el artisma vidpunkto.

Post la fino de amuzaj horoj oni ŝanĝis la ejon por ĉeesti "Interkonan Vesperon" al la fiziologia lekcio. Jam estis 17.5 horo. La aŭtuna suno estis subiranta en serenon okcidenton.

La vespera festeno estis modesta, sed gaja eĉ kun modera kvanto da biero por ĉiu. Jam tie kaj ĉi tie fluas kaj bruas gaja interbabilado. S-ro Ossaka, de

Japana Esp-Instituto, ekstaris kaj rakontis humore pri siaj esp-istaj travivaĵoj antaŭ tridek jaroj. Post li, li nomis alian kaj laŭ la nomado de parolintoj la nomitoj devis stariĝi por paroli ion. Tiel multaj niaj "pioniroj" parolis. Ili ĉiuj kvazaŭ ekposeditaj de ia emocia sento unanime temis pri "antaŭ tridek jaroj". "Antaŭ tridek jaroj" preskaŭ ĉiuj el ili estis junaj studentoj, sed nun pli-malpli

eminentaj kaj kelkaj eĉ gravmienaj. Jes, antaŭ 30 jaroj ili kunlaboris kun s-ro Ossaka kaj sukcesis meti la firman bazon de la Japana Esp-movado kun la Instituto kiel la centro. La gaja atmosfero ĵetis nin en esp-istan ekstazon kaj ni tute forgesis la tempo-pason. Ni ege bedaŭris, kiam oni anoncis ke ni devas disiĝi je la 19.5 horo promesante morgaŭan revidon.

LA DUA TAGO — La tago estis serena. Jam antaŭ la 9-a horo multaj svarmis ĉe la kongresa poŝtoŭicejo, instalita antaŭ la enirejo, ĉe la ekspoziciejo de esperantaĵoj. Ĉe la kongres-poŝtejo oni vendis poŝtkartojn kaj kovertojn ilustritajn de bela memoriga desegnaĵo. Ĉion ĉi aranĝis membroj de Orienta Societo de Esperanta Filatelo. La elmontron de esp-aĵoj aranĝis s-ro Saburo Ito, malnova agema samideano: diversaj eldonaĵoj ĉefe pri eduko, kiuj pritraktas esperanton, kaj diversspecaj kulturaj materialoj Esperantaj. Inter alie, la libreto "El Japana Lando kaj Popolo de Infanoj" eldonita de Heibonŝa tiris specialan atenton pro ĝia taŭgeco kiel propagandilo. Ĝi estis senpage havebla por ĉiu.

De la 9-a ĝis 10.5 horo oni havis fakkunsidojn en la ĉambroj de la fakultato: Natursciencista, Instruista, Blindula, Virina, Studenta, Laborista kaj

aliaj.

De la 10.5 horo Ĝenerala Kunsido de Japana Esp-Instituto okazis en la hieraŭa kongresejo. Post la klarigo pri la kaso, s-ro Mijake raportis pri la Premio al Lokaj Organoj. La Premio de tiu ĉi jaro (donacita de anonima membro) iris al "Leontodo", organo de la Otaru Esp-Societo. Estis bedaŭro ke koncerne la Unesko-rezolucion, mankis al ni la tempo por diskuti konkretan metodon kiamaniere japanaj esp-istoj kontaktiĝu kun lokaj kunlaboraj organizoj de Unesko. Per la fotografado ekster la domo la unua programo de l' dua tago finiĝis. Tagmeza ripozo.

La posttagmeza programo komenciĝis je 13a por Kongresa Universitato. Paralele kun ĝi en aparta ĉambro okazis la Ekzamenoj por Scipovo Esperanta, elementa kaj altgrada, sub la aranĝo de J. E. I. Ĉe Kongresa Universitato salutis Irana samideano, s-ro Moghbel, kiu kun la edzino ĵus antaŭe alvenis por la Kongreso. Li nun loĝas en la urbo Himeĝi, laborante kun siaj kelkaj samlandanoj ĉe komerca kompanio. Li estas Bahaano. Lia ĉeesto iomete pliiĝis la internaciecon de la Kongresejo.

La Kongresa Universitato estis tre sukcesa. S-ro Blatt, prof. Rĵoji Ura kaj s-ro Tokuja Azumi laŭvice faris interesan kaj utilan paroladon. Precipe, "Rememoro pri la internacia kongreso de kvakeristoj", farita de s-ro T. Azumi, eksguberniestro de Okajama, estis plej elstara parolado el la vidpunkto de la enhavo kaj la maniero kun la sola bedaŭro ke li parolis en la nacia lingvo. Laŭ li, la gravaj mankoj, kiujn li trovis en la supremenciita kongreso, treege instigis lin relerni esp-on. La ĉefa kaŭzo de lia reentuziasmiĝo estas ke la angla lingvo, kiel la kongresa lingvo de kvakeristoj, ne estis facile komprenata eĉ inter

angloj kaj usonanoj, kaj ke antagonismo kontraŭ la uzo de nacilingvo estas granda. Li diris, ke dum la tuta periodo de la kongreso li vane konvinkadis la ĉeestantojn pri la neceso de Esp. Li bedaŭris ke eĉ kvakeristoj, kiuj devus esti plej senantaŭjuĝaj pri rasoj, koloroj kaj gentoj, ne komprenis la urĝan bezonon de l' internacia helplingvo. Li akcentis ke tiu ĉi fakto estas diskoniginda! Lia parolado finiĝis per jenaj belaj vortoj: Japanujo devas esti la lando de esperantistoj post 10 jaroj, anstataŭ la vortoj de Stanley Jones, "Japanujo estos de katolikoj post 10 jaroj".


La sekvinta Laborkunsido de la Kongreso ne havis speciale menciindan gravaĵon, tamen mi anoncas ĉi tie ke la venontjara Kongreso okazos en Tokio. D-ro H. Jagi elektigis ne nur kiel la prezidanto de la Konstanta Kongresa Komitato, nove starigita dum la kunsido, sed ankaŭ kiel la Japana Reprezentanto por ĉeesti la 39-an Universalan Kongreson en Haarlem dum sia oficiala vojaĝo al la Internacia Kongreso de Akusistoj kaj Ginekologoj okazonta en Ĝenevo.

Pro manko de l' tempo la raporto de Fakaj Kunsidoj estis limigitaj por po 2 minutoj. Kun kelkaj esceptoj, ĉiuj raporto estis banalaj. Nun la Kongreso venis al la finalo kun la kantado de "Tagiĝo".

LA TRIA TAGO — La vetero favoris ankaŭ la postkongresan ekskurson. Ĉ. 60 kongresanoj en speciala aŭtobuso forlasis la Kongresejon je la 8a, kaj alvenis al la parko "Koorakuen", unu el la Tri Naciaj Parkoj. Post iom da promeno, ni denove enaŭtiĝis kaj post 100 minutoj ni atingis la celokon, la monto Ŭaŝiu. De sur la supro de la monto ni ĝue admiris la pitoreskan panoramon de l' Seto Enlanda Maro

kun diversformaj insuloj grandaj aŭ malgrandaj, kovritaj de pinoj. La montaro de Ŝikoku-insulo estis videbla en la malproksimo. Vere majstra pejzaĝo de la Kreinto.

La Seto Enlanda Maro allogas vojaĝantojn ne nur pro sia ĉarmo, sed ankaŭ pro siaj arkeologiaj intereso. Multaj vivmaterialoj, kiujn la antikvaj japanoj



La bela ridanta perspektivo de la Seto Enlanda Maro de sur la monto Ŭaŝiu

enportis (ĉ. 800 a.k.) el la kontinenta Azio pere de krudaj pitoreskaj kanotoj, ankoraŭ estas trovataj sur tiuj insuloj. Tio ĉi estas parta kialo, kial Michigan-Universitato de Usono fondis en 1949 en la urbo Okajama la Centron por Studo pri Japanaj Aferoj.

Sur la revenvojo la kongresanoj vizitis Muzeon de Popol-Metiaĵoj kaj ankaŭ Arkeologian Muzeon en la urbo Kuraŝiki, kies estraro bonvenigis nin ĉiujn. Oohara-Muzeon de Belartoj ni ne povis vidi, ĉar ĝi estis fermita pro libertago. Anstataŭ tio ni tamen povis viziti la Zoologian Ĝardenon de Ikeda Paŝtejo en Okajama. La edzino de la ĝardenestro estas la tria imperiestra princino.

Bone sukcesinta Kongreso!
Koran dankon al la gastamaj samideanoj en Okajama! Ĝis la revido en Tokio!

(N. Esumi)

GAZETOJ RICEVITAJ INTERŜANGE

(La plej laste ricevitaĵoj n-roj indikitaj)

★ Esperanto (UEA), Oktobro ★ Heroldo de Esperanto, n-ro 16 ★ La Praktiko, Aŭg./Sept. ★ The Greater World, No. 1325 ★ Children's Greater World, October ★ Informilo de I.G.E.L., n-ro 5 ★ Sennaciulo, Novembro ★ Steps unto Him, September ★ Dia Regno, Oktobro ★ La Ĝusta Vojo, Novembro ★ Laborista Espisto, Novembro ★ Newsletter, No. 19 ★ Boletin, n-ro 10 ★ Franca Espisto, Nov./Dec. ★ La Ĉenero, Oktobro ★ El Popola Ĉinio, Novembro ★ The British Espist, Sept./Okt. ★ La Rondo, n-ro 58 ★ Belga Espisto, Oktobro ★ La Esp-ista Laboristo, Julio/Aŭg. ★ Clube Filatélico, Majo/Okt. ★ American Esperanto Magazine, Sept/Okt. ★ Esperanto en Skotlando, Oktobro ★ L' Aube Nouvele, July/Aug. ★ Nia Stelo, Septembro ★ Semu Konstante n-ro 42 ★ Svenska Esp. Tidningen, Oktobro ★ Boletim de Esperanto, Sept./Okt. ★ La Suda Stelo, Aŭg./Okt. ★ Scienca Ligilo, Aŭg./Okt. ★ L' Esperanto, n-ro 21 ★ Land & Liberty, Sept/Oct. ★ Esperanto-Post, November ★ Drei Eichen Blätter, Oktober ★ Svisa Espero, Oktobro ★ New Zealand Esp-ist, October ★ Brazila Esp-isto, Marto/Aprilo ★ 人民中國, n-ro 5 ★ La Revuo Orienta, Decembro ★ La Movado, n-ro 34 ★ Samideano, n-ro 29 ★ El Japanio, n-ro 21 ★ Liberecana Civitano, 10/Nov.

TRI AMATINOJ

/Slovena popolkanto/

El amatinoj tri
Ĉiu gracia
Arĝenton havas ŝi
Oron alia.

Ringeton havas ŝi
Perlojn alia
Korsaĵon sur tali'
Portas la tria.

Plej junan prenis mi
Ĉiam prefere
Ĉar amas tiu ĉi
Min plej sincere.

LA DESTINO

/Narcyza Zmichowska/

La suno hele al ni brilas
Birdo revas nin
Suno lunas, birdo trilas
Ĉiu laŭ destin'.

Via koro por amado
Frunto por kronet'
Buŝo via por kisado
Por kares' manet'.

Tia estas volo Dia
Ne malhelpu ĝin!
Amu, kisu kara mia
Kaj karesu min!

trad. Dabrowski Henryk
(Polujo)

Anoncetoj

EKSPOZICIO INTERNACIA: La esperantoklubo, "La Aglo" en Karlskoga, Svedlando, nun kaptis la ideon. Knabino en nia urbo nome gajnis diplomon en la internacia ekspozicio en Gvatemalo, kaj tio vekis intereson ĉe ni. Ni aranĝos la 3an ĝis 13an de septembro 1954 en la Arta halo montradon kaj konkurson internacian. En tiu konkurso oni disdonos premiojn je valoro de 750 steloj, ĉ. US-dol. 60.-, tiel ke la gajnonto en ĉiu jarklaso de 7 ĝis 14 jaroj ricevos premion je valoro de ĉ. 55 steloj, kaj la sekvantaj 4 po unu.

Ni esperas, ke samideanoj ĉirkaŭ la terglobo interesiĝos pri la afero kaj kunhelpos instigante la instruistojn aranĝi en siaj klasoj desegnadon sub la temo: Nia lando kaj popolo. El tiuj desegnoj ni petas la instruistojn elekti la plej bonajn kaj forsendi al la suba adreso.

Se la montrado fariĝos sukcesa, eble estos aranĝata migranta ekspozicio tra tuta Svedlando. Dorsflanke de la desegnoj skribu PRESLITERE nomon kaj adreson, sub la bildo titolon, nomon, aĝon kaj landon. La desegnoj devas esti ĉi tie antaŭ la fino de junio 1954 sub adreso: Karlskoga, Esp. Soc. La Aglo c/o Gunhild Tistad, Hotellgatan 5, KARLSKOGA, Svedlando.

Pri Kameoka Infanejo



Kohei Deguchi

La problemoj pri la bonstato de infanoj rapide informiĝis tra la japana socio de post la fino de la IIa mondmilito. En 1947 oni starigis la Leĝon pri Bonstato de Infanoj, kiu fiksas interalie la respondecon de la ŝtato kaj lokaj komunumoj pri la garantiado de l' infanoj por ke ili estu naskataj kaj vartataj kun sanaj korpoj kaj spiritoj.

Tiamaniere la bonstato de la infanoj ekhavis leĝan bazon kaj rapide sinsekvas diversspecaj institucioj por tiu celo.

La Infanejo estas unu speco de tiuj instalaĵoj: ĝi estas la ejo, al kie gepatroj konfidas dumtage siajn infanojn, kiam ili ne povas mem prizorgi pro sia taglaboro aŭ malsaniĝo. Nuntempe la infanejoj de la tuta lando nombriĝas 6.000 kaj la akceptitaj infanoj entute 578.000. Sed bedaŭrinde mil kelkcent miloj da infanoj ankoraŭ restas neakceptataj pro manko de ejoj.

La komenco de Kameoka Infanejo estis simpla plenaera vartejo; en 1949 la Urba Virina Societo de Kameoka kaj Oomoto Virina Societo kunlaboris aranĝi tiun vartejon por progresigi la bonstaton de la infanoj en la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Kaj poste dank' al la mon-kampanjo, kiu disvolviĝis landskale du jarojn pere de la Tutlanda Federacio de Oomotaninoj, la nuna bela konstruaĵo ellaboriĝis en 1951, kaj la vartejo tuj ricevis koncesion de la ŝtato kiel oficiala infanejo.

En Kameoka-teritorio nun estas 2.200 infanoj, kiuj bezonas esti vartataj, sed por ili estas nur unu infanejo. Ĉirkaŭaj vilaĝoj finance neriĉaj ne kapablas fondi



Regula ekzameno pri la sanstato de la infanoj

novajn instalaĵojn; oni do ne trovas alian rimedon ol alkonstruigi la nun funkci-antan Infanejon. Tamen, ĉi tie restas demando, ĉu tia instalaĵo, kia akceptas tiel grandan nombron, estas konforma je la vidpunkto de infan-sociologio.

Ĉar tio ĉi estas la plej grava problemoj por bonstato de infanoj, mi faris esploron el diversaj flankoj kaj venis al la jena konkludo: t.e. se oni plene kompletigas la instaladon, eĉ en multnombra akceptejo oni povas akiri tute saman rezulton kiel en malmultnombra.

En Japanujo la minimuma amplekso de infanejo estas laŭleĝe fiksita je kvindekono da aro po unu infano, tamen oni nun konsideras ke ĉe grandskalaj infanejoj ĝi devas esti pli ol duobla.

Sub tiuj premisoj mi planis pligrandigi


la nunan konstruaĵon por ke pli multaj infanoj estu akceptataj. Kaj ni fine sukcesis konstrui la aldonan domon kun vasteco de 3.5 aroj en aŭgusto de tiu ĉi jaro.

La konstruado de tiu ĉi domo mi penis projekti, konsiderante antaŭ ĉio la ĝojon kaj komforton de infanoj mem. Mi tial evitis la ordinaran unuforman stilon de lernejoj. Plie mi aranĝis la tutan internajn per koloro-aplikado kun senbrila ŝmirajo. En Japanujo oni ĝenerale povas trovi partan koloro-aplikadon, sed escepte nian infanejon, supozeble oni nenie trovas tian kompletan aplikadon al la tuta konstruaĵo kun eduka celo.

Por la kruidoroj: plankoj, paneloj, muroj, plafonoj, fenestro-kadroj, kaj por la ĉambroj: frontmuroj, triflankaj muroj, plankoj, plafonoj, fenestroj, pordoj ktp... ĉio ĉi tio estas kolorita per koloroj konvenaj por iliaj respektivaj celoj, konsiderate de la vidpunkto de l' infana koloro-psikologio. Kiel ekz.: por neaktivaj, nesocialaj infanoj, frontmuro estas kolorita helverde, triflankaj muroj — hele-sune-kreme, enirpordo — pale-perle-grize. Por la dormoĉambroj mi elektis helbrunan koloron por ke ĝi kaŭzu facilan ekdormon. Krom tio mi elektis, kompreneble, diversajn respektive harmoniigajn kolorojn sur aliaj partoj: paneloj, fenestroj ktp.



Per bildlibroj infanoj gajnas juĝkapablon.



Amuziĝantaj infanoj sur sportaj ludiloj

Tiamaniere ni nun akiras multajn sukcesajn rezultatojn, kiuj tiom pli instigas nin studi pluen.

Nun mi prezentu ekzemplojn pri nia projekto farita super la ekipado rilate al la disciplinigo de infanoj: por specialaj ĉambroj kiel kuracejo kaj similaj kien la infanoj ne devas arbitre eniri, la pordteniloj estas supre alfiksitaj super la infana alteco. Kaj cetere ĉiuj pordoj estas faritaj glate sen ia elstarajo por ke la infanoj ne povu ludi pendante per manoj aŭ grimpante per piedoj.

Tiele ni metas nian atenton sur la vartadon de la infanoj, prizorgante la cirkonstancojn, kiuj grave efikas super iliaj karakteroj. Estas proverbo: Infana inklino restas ĝis la fino. La modernaj prihomaj sciencoj asertas ke la fundamentaj karakteroj de maturiĝintaj homoj formiĝis jam en infaneco de 3-jara ĝis 6-aŭ 7-jara. Tial, se oni volas havi esperon pri la socio de la venonta generacio, oni ja devas doni bonan edukon al la nunaj infanoj, kiuj ja estas portantoj de la sekventa epoko. La publika intereso pri ĉi tiu punkto ankoraŭ ne estas alta; do ni bezonas multe pli kunlabori, oferante nian tutan energion. Trad. La Red.

Noto: La verkinto atendas la alsendon de multaj bonaj materialoj aŭ opinioj de l' legantoj pri tiu ĉi problemoj, kaj li certe reciprokas ilin. La Redakcio volonte peras la komunikadon.

Kelkaj Komentoj el UHA-Jurnalo

Virtuala Atomo

En la urbo Kioto la 18-an de septembro sub la prezido de prof. A. Pais, Princeton Universitato, Usono, komenciĝis la Internacia Konferenco pri Teori-fiziko, al kiu aliĝis multaj famaj fizikistoj de la tuta mondo.

Sendube estas jam vaste kaj populare konate, ke la minimuma substanco estas atomo. Sed laŭ la raportoj de la Konferenco, lastatempe oni eltrovis multajn elementajn *partiklojn* kiuj konsistigas la atomojn kaj ŝajnas ke la fizikistoj estas embarasitaj por trovi la unuecon inter la teorioj pri la novaj eltrovaĵoj.

De post kiam d-ro Jukaŭa proponis la ekziston de π -mezono, sinsekve eltroviĝis multaj partikloj, nome: u -mezono, t -mezono, V_1 -partiklo, κ -mezono kaj V_2 -partiklo ĝis fine prof. Pais tiun ĉi fojon eltrovis baritoronon. Demokritos, la granda filozofo de Grekujo en la jaro 460-a antaŭ Kristo, unue iniciatis la atom-teorion kaj en la daŭro de pli ol 2,400 jaroj ĝi restis nepruvita de sciencistoj. Tio sugestis al ni, ke la "Di-plano" vere bezonas treege longan tempon por realiĝo.

Pri atomo Demokritos difinas, ke en la mondo troviĝas du specoj de atomo: virtuala kaj reala, kaj tiu ĉi lasta verŝajne estas identa kun la atomo materia pri kiu nuntempaj fizikistoj diskutas. Hipotezante la ekziston de virtuala atomo li klarigis pri la animo jene: animo konsistas el glate flosantaj virtualaj atomoj, kiuj en la tuta korpo plenpleniĝas, osmoze flosante inter realaj

atomoj kiuj konsistigas la homan korpon. Kaj plie li asertas, ke spirado estas utila por metaboli ne nur aeron sed ankaŭ virtualajn atomojn, sekve la halto de ĉi tiu funkciado signifas morton. La problemo, ĉu tiu teorio pravas aŭ ne, dependas sole de la estonta progreso de la scienco.

Tamen lastatempe d-ro Jukaŭa atentigis en sia verko, "La Nevideblaĵo", ke statistikaj leĝoj jam ne klarigas la agadon de l' homo, ĉar la animalo devas havi en si, por tiel diri, diskomunikan sistemon kiu funkcias por ke unu certa ago kontraŭ unu atomo rekte kaj momente komunikiĝu tra la tuta korpo; kiel ekz., apenaŭ kato trovas raton, ĝi tuta ektenas sin ĵeti sur la raton, hirtigante ĉiujn harojn sur la tuta korpo.

Nu mi opinias, ke se temas pri homo, la kreaĵo de pli kompleksa strukturo, ne sufiĉas la ekstera observado kiel fizik-kemia metodo, sed la interna metodo ja estas aplikenda. Se oni ne hipotezas tian diskomunikan sistemon oni ne facile povas kompreni ankaŭ la fakton, ke kuracisto sukcesas forigi en nur kelkaj minutoj doloron de gastralgia paciento sole per morfin-injekto ĉe lia brako.

Se la teorio pri la virtuala atomo estos pruvita de nuntempaj sciencistoj tiaj problemoj, kiaj ŝajnas esti misteraj precipe kiaj koncernas la animon, facile kondukiĝos al neantaŭvidita solvo. Al mi ŝajnas, ke *Ka-so* (fajraj *elementoj*) kaj *Sui-so* (akvaj *elementoj*), kiujn nia Majstro O. Deguĉi preparolis en siaj verkoj "Rakontoj el la Spirita Mondo", eble koincidas kun la virtuala kaj reala atomoj de Demokritos; tio estas: virtuala atomo *Ka-so*, reala atomo *Sui-so*.

Mi estas certa, ke la scienco faros pli brilan progreson, se la sciencistoj rekonos Dion kaj estos fidelaj al Liaj revelacioj.

Trad. V. F.

La Mirlando — Materia

La Internacia Konferenco pri Teorifiziko — pri la malfacila temo por la ĝenerala publiko — okazis en Kioto, 19-23, sept., 1953. Ĝin partoprenis proksimume 400 teorifizikistoj el 14 landoj. La Konferenco de tia speco kaj kun la partopreno de tiom da mondfamaj kaj eminentaj sciencistoj neniam antaŭe okazis en Japanujo. Kion ili faris? Ni montros iom el la ĉefaj temoj pritraktitaj.

*

Oni ĝis nun konsideris, ke kvankam la materio estas per si mem senpeza, konsistas el tiaj tre *fortaj* elementoj, kiaj elektronoj, fotonoj, neŭtronoj kaj mezonoj, kies lastan ekziston eltrovis d-ro Jukaŭa. Ili ĉiuj nomiĝas elementaj partikloj. Tamen, lastatempe oni malkovris dudekon da novspecaj sinsekve, kvazaŭ ĉiu el ili estus ja *la plej* elementa ero de materio! Jen estas ekz., neŭtrino, u -mezono, t -mezono, v -partiklo, κ -mezono, z -mezono ktp. Nun la nombro de tiuj eroj jam estas tro multa, por ke oni esploru ilin unu post la alia. Kion do fari pri ili? Ĉi tio estis la unua temo.

*

Preskaŭ ĉiu materia substanco estas konstruita de subtilaj eroj nomataj atomoj kompakte kuniĝantaj unuj kun la aliaj en regula formo kvazaŭ ŝtonmuro. Sed en diversaj lokoj troviĝas "truetoj", kie mankas la atomoj. Kaj ju pli multe troviĝas la "truetoj," des pli facile estas rompebla la materia substanco. Tamen oni rimarkis la jenan fenomenon: Se

oni lasas zinkon, arĝenton, stanon kaj similajn en iu certa stato dum unu jaro, sur ili kristaliĝas mikroskopaj "pingletoj," kelk-milimetrojn longaj kaj 10^{-3} milimetrojn dikaj. Oni nomas ilin "lipharoj de kato". Ĉi tiuj estas kelkcentoble pli fortaj, ol kiaj ajn artefaritaj "pingletoj" de la sama longeco kaj dikeco. Kial? Post detala eksperimentado oni konstatis, ke en la substanco kiu konsistigas la "lipharojn de kato" tute ne troviĝas la suprediritaj "truetoj." Kiamaniere oni do artefaru la similan substancan sen truetoj? Tio estis la dua temo.

*

Super la terglobo trakuras io simila al lumo, sed ne videbla, nek sentebla. Ĝi nomiĝas "kosmoradio." Oni malkovris, ke en la kosmoradio sin trovas multe da elementaj partikloj. Dum ĉi tiuj partikloj atingas la teron, ili ofte frapante sin kontraŭ la atmosfero foje elsputas gason kiel ĵet-motoro. Inter ili troviĝas v -partiklo, kies vivlongo estas nur 10^{-10} sekundo. La tutan fenomenon oni eksperimentas per aparato nomata "kosmotrono." La Konferenco pritraktis tiujn eksperimentaĵojn.

*

La Granda Naturo nur evoluas kaj kreskas, sed neniam malevoluas. Kial? Jen la tria temo.

*

Fero altiriĝas al magneto kaj povas magnetiĝi, sed neniam rusto sur ĝi, ĉar en ĝi la elektronoj eksidas unuj kontraŭ aliaj en ĝuste inversa pozicio. Tamen en la okazo Matai (?), uzata por registrila rubando, unuj elektronoj eksidas en inversa ordo, sed aliaj ne. Tial, kiam ĝi estas magnetita, la magnetismo ne foriras. Dank' al tiu ĉi propreco oni povas uzi la sonregistratan rubandon

kiom ajn ofte ripetante. Studi pri tia magnetismo estis ankaŭ unu el la temoj.

*

En la peza atomnukleo de Uraniumo sin trovas kelkaj nestabilaj neŭtronoj. Kiam ili kolizias kun de-eksteraj mezoneoj, la atomnukleo disrompiĝas en du-tri pecojn. La energio kiu eliras okaze de la disrompiĝo estas aplikata por eksplodigo de atombombo.

En la malpeza atomnukleo de Hidrogeno ankaŭ sin trovas iuj nestabilaj neŭtronoj. Kiam oni donas al ili intensan varmon, ili kunfandiĝas kaj transformiĝas en atomnukleon de Heliumo. La energio, kiu naskiĝas en tiu ĉi okazo, estas aplikata por eksplodigo de hidrogenbombo. Do, kia estas la strukturo de la atomkerno? La Konferenco studis pri tio.

*

Vere, la materia mondo estas la Mirlando! Kiu kreis ĝin? Kio estas la Forto, kiu funkciigas ĝin?

Trad. I. Nagai

Politiko kaj Religio

Oni raportas ke antaŭ nelonge Kanceliero Adenauer de l' okcidenta Germanujo faris paroladon al junaj studentoj de Bonn Universitato rilate al la reordigo de Eŭropo kaj Germanujo, kaj en ĝi li emfazis, sur kio oni metu fundamentajn principojn de la restarigo.

Adenauer klarigis en sia parolado ke, por ke Eŭropo kaj Germanujo estu sufiĉe rekonstruitaj por reakiri la iaman prosperon kaj grandan influon al la mondo, la tuta Eŭropo, kiu havas unu komunan kulturon kaj Kristanismon, estu antaŭ ĉio unuigita, kaj li akcentis

speciale ke la religia elemento de Kristanismo devas esti la nepra kondiĉo por la restarigo. Estas tre notinde, ke la politika partio, kiun gvidas Adenauer, sin nomas "Kristana Socialdemokratia Partio."

Plie, la parolado de Adenauer klarigis ankoraŭ unu punkton: la rolo de Germanujo mem. Li reliefigis la pozicion de Germanujo en Eŭropo kaj la malhavecon de Eŭropo je Germanujo dirante, "Eŭropo sen Germanujo ne estas Eŭropo, kaj Germanujo sen Eŭropo ne estas Germanujo."

Koncerne tion, prof. Tezuka de Tokio-Universitato, citas la religian opinion de Adenauer kiu akcentis la necescon de l' religia memkonscio, asertante ke nek Eŭropo nek Germanujo povas restariĝi, se ili staras sole sur materiisma vivkompreno. Kaj la profesoro sincere diras, ke en la parolado de tiu germana ŝtatisto estas manifestataj liaj altaj konceptoj pri la civilizo, mondo kaj religio.

Jam estas la tempo, kiam ĉiuj estontaj ŝtatistoj ne nur devas forĵeti tian simplan pensmanieron, ke la politiko estas nur la metodo perforte konduki la homojn kaj la materialojn, sed antaŭ ĉio devas alproprigi al si la altajn konceptojn pri civilizo, vivo kaj religio. Ju pli komplikigigas la aktuala situacio de la mondo, des pli oni bezonas sintezan klarecon bazitan sur altaj mondkonceptoj.

Samtempe la popolo mem bone komprenu ke la politiko devas esti en plena akordo kun la altaj konceptoj pri civilizo, mondo kaj religio, kaj oni devas trovi sian landon kaj la Mondon en la ĝusta rilato kaj situacio.

Trad. S. Takahaŝi



Literatura Rubriko



LA HOMARO KAJ LA MONDBILDO DE MARTINUS. El la dana originalo tradukis C. Graversen. Bindita en verda tolaĵo kun

orpresita simbolo sur la frontpaĝo. Formato 18 x 19 cm. 124 paĝoj. Prezo: 6,50 danaj kronoj aŭ 11 int.respk. + 10 % por sendkosto. INFORMILO; formato 18 x 25 cm., 25 paĝoj. Prezo 2,40 dkr. aŭ int.repk. KAJERO N-ro 1; formato 11 x 15 cm., 12 paĝoj. Prezo: 0,60 dkr. aŭ 1 respk. Eldonis Esperanto-Sekcio de la Spirit-Scienca Instituto de Martinus, Mariendalsej 94-96, Kopenhago F. Danujo.

Per sinsekva eldonentrepreno la Esp-Sekcio de la Spirit-Scienca Instituto de Martinus agadas tre aktive por la bono de Esperantujo. Koncerne la unuan libron "La Homaro kaj la Mondbildo", ni jam prezentis al niaj legantoj ĝian prospekton en la n-ro 3-4 de OOMOTO. Kiel la prospekto iom sugestis, la esenca instruo de Martinus estas: laŭ ordono de Jesuo amu la proksimulon kiel sin mem. Liaj kosmologiaj ideoj, kaj la analizoj pri vivo kaj konscio kun ties etendiĝo tra la senfina spaco celas doni la sciencan pravigon al la ordono de Jesuo, donante surbaze de racio la ĝeneralan konon pri ĝi, anstataŭ — kiel ĝis nun — surbaze de sentoj kaj kredo. Per unu vorto, la doktrino de Martinus bazas sin ne nur sur la esenco de mondreligioj, sed ankaŭ sur la rezultatoj de la fizika scienco.

Laŭ la listo de lia verkaro, enmetita

en la libro, liaj kosmaj analizoj ampleksas diversajn temojn kiel ekz.: vivspertado, morto, malsano, sufero, milito, primitiveco, pensado, religio, scienca esplorado, la seksa mistero, reenkarnejo, senmorteco, eterneco, arto, kulturo. La nombro de la libroj, kiuj pritraktas tiujn temojn en la dana lingvo estas sufiĉe granda. Tial mi ne estas rajtigita, nek kuraĝas fari konkludon el tiu ĉi libreto, nur fragmento de lia kolosa verko. Sed ĉar ĝi ankaŭ entenas multajn esencajn punktojn el liaj teorioj, mi provos resume prezenti la konturon. Antaŭ ĉio lia argumento estas treege logika, simpla kaj klara. Ja mirinda talento! Li analizas, ke la mondo konsistas en la triunueca principo: la mio, la kreopovo kaj la kreitaĵo aŭ la mio, la konscio kaj organismo. Unuavide tio tre similas al la instruo de Oomoto-religio: animo, forto kaj korpo; sed la starpunktoj ne estas samaj. La unua staras sur la rezultatoj de la fizika scienco, dum la dua ĉefe sur la metafiziko. La unua do diferencas ankaŭ de la starpunktoj de la spiritisma doktrino pri la senmorteco de la animo, la naturo de la spiritoj kaj ties rilatoj kun la homoj. Pri la mio, la unua asertas ke ĝi estas neanalizebla per tempo-kaj spaco-limigitaj esprimiloj, sed difinebla kiel "io kio estas". Laŭ la doktrino de Oomoto-religio ĝi estas dividebla en tri: la ĉefgardanta spirito, la vicgardanta spirito kaj la vera-gardanta spirito. Laŭ la psikanaliza teorio de Sigmund Freud, la "mio" konsistas el tri partoj: la mio, kiu estas blindaj, biologiaj fortoj devenantaj de naturo; la

super-mio, kiu estas reflektajo de instruoj de gepatroj kaj aliaj; kaj meze inter tiuj ia mi-o, kiu-formiĝas per laboro de la persono mem por adapti la ricevatajn opiniojn al siaj karaktero kaj medioj. Mi prezentis ĉi tiujn du starpunktojn esperante ke Martinus iam provos tuŝi la problemon pri la ligiteco de materio kaj spirito, ĉar tio estas la plej grava punkto por la solvo de la homaj problemoj.

"Informilo" pritraktas: Simbolo pri la konscio, pri la psiko, de la vivanta estaĵo kaj la biografio pri Martinus. Laŭ la biografio, Martinus naskiĝis en Nordjuto (Danujo) en la jaro 1890. Li elkreskis en la hejmo de geonkloj, malriĉaj kamparanoj. Martinus lernis laktistan metion kaj laboris en diversaj laktejoj ĝis la aĝo de 30 jaroj, kiam li ricevis revelacion. Li ne kolektis sian scion el libroj nek de aliaj homoj, tial liaj verkoj estas faritaj per konscia apliko de la intuicio. Tio tute ne rabatas lian meriton, neniel; pri la profunda saĝeco de tiu neinstruita homo, legantoj tuj rimarkos kaj miregos, se ili eklegos la menciitajn librojn. Jen kial la Esp-sekcio entreprenis eldoni ilin nur en grupo de kelkaj volontuloj, ricevinte subvencion de neniu.

Pri la lingvaĵo sufiĉas nur mencii ke Literatura Komitato SAT kontrolis la libron, "La Homaro kaj la Mondbildo." (S-roj Faŭlhaber kaj Szilagy kontrolis kaj s-ro Faŭlhaber tre laŭdis la perfekt-econ de la tradukaĵo.) Mi sincere gratulas la Esp-sekcion pro ĝia grava laboro kaj esperas ke la kosmologiaj ideoj de Martinus multe kontribuos al verŝerĉantoj de la mondo. (N.O.)

RAKONTOJ DE VELKINTA FOLIO, la originala verketo de Vasilj Eroŝenko. Represita de Japano Esperanta Libro-

kooperativo (72 Kitaoogi-maĉi, Kita-ku, Osaka, Japanujo) el "La Ĝemo de Unu Soleca Animo" eldonita de Orienta Esp-Propaganda Instituto en Ŝanhajo, 1923, kun kelkaj korektoj. Formato: 10.5 x 15 cm.; 40 paĝoj; prezo: ¥ 50.

La verketo konsistas el 6 apartaj rakontoj, kiuj tamen estas kunligitaj en lerta aranĝo kun unu stratarbo, simbolo de la temo. Tra la libro reflektiĝas la sentimentalismo de la aŭtoro kontraŭ la tiraneco kaj koloniismo en la malnova Ĉinujo. La stilo estas simpla kaj flua; legantoj sentos legi kvazaŭ proz-poemon. La aŭtoro estas ruso konata kiel blindula poeto esp-ista. Antaŭ 40 jaroj li travagis orientajn landojn kaj loĝis kelkajn jarojn inter esp-istoj en Japanujo. Lia deklamarto de esp-aj poemoj estas tiel eleganta ke li iam akiris laŭdon ĉe Universala Kongreso. Li postlasis ankaŭ kelkajn satirajn fabelojn verkitaĵojn en bona japanlingvo. Bedaŭrinde ni ne informiĝas pri li de post lia hejmeniro al Moskvo.

Pri la lingvaĵo mi rimarkis kelkajn korektindaĵojn, ekz.: sur p. 16... ili (la 7a linio de malsupre) devas esti geonkloj, sur p. 25... tero (la 1a l.) devas esti arbo. Cetero ne mankas mispresoj.

Aprobinda estas la entrepreni de la eldonejo, kiu eldonis ĝin ĝuste por la 40-a Japano Esp-Kongreso (ĉi-jara). Ni rekomendas la verketon kiel ĉarman legaĵon. (N.E.)

LA TENTO DE LA JUNULO, originala versaĵo de Geraldo Mattos, kun la antaŭparolo de Ismael Gomes Braga. Eldonita de Cooperativa Cultural dos Esperantista, Ltda. (Rio de Janeiro, Brazilo). Formato: 11.5 x 16 cm.; 18 paĝoj; prezo ne montrita.

La sesjamba versaĵo, konsistanta el kvar partoj, temas pri la konflikto en la

animo de la juna Zamenhof ĉirkaŭ la jaro 1880. Kun tiu ĉi unua verketo, la aŭtoro, ankoraŭ 21-jara brazila studento, debutis sukcese en la esp-an poezikampon. La estonteco de tiu ĉi nova stelo estas multe promesriĉa pro lia mirinda talento. Kun la legantoj ni atendu lian daŭran kaj persistan laboron kaj la publikigon de liaj pluaj verkoj.

(Ŝ. U.)

★ **KIAL MONDREGISTARO?** eldonita de Universala Ligo (Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando). Represo el **LA PRAKTIKO**, N-ro Nov-Dec, 1952; formato: 12 x 15 cm.; 15 paĝoj; prezo: 1 resp.kup. aŭ 1 Stelo.

★ **Evangelia serio: LA DIA VOJO**, Kajero 5 kaj **RELIGIA VIVO**, Kajero 6; eldonitaj de Esperantomissionen (Klacksavägen, NORA STAD, SVEDUJO); formato: 10.5 x 14 cm.; 16-20 paĝoj; prezo po kajero: 2 resp. kup.

★ **LIBERIGO DE TIMO KAJ MIZERO**, ekonomia verko kompilita de Th. Stillebroer; eldonita de Internacia Asocio Bellamy (Koningstr. 188, Beverwijk, Nederlando); formato: 14 x 21 cm.; 20

paĝoj; prezo: 0.15 dolaro aŭ 2 resp. kup.

★ **FILOZOFIO KAJ PSIKOANALIZO**, kopio pri prelego de Arne Glud, farita ĉe la dua Internacia Konferenco de Esp-istaj Studentoj kaj Altlernejoj en Ljubljana, Jugoslaviujo; havebla ĉe la aŭtoro (Ved Sønderport 22, Kopenhavn S, Danujo) kontraŭ 2 resp.kup.

★ **LAGO DE COMO**, 12-paĝa kolor-ilustrita faldfolio, kaj 12-paĝa esp-lingva gvidlibreto. Senpage havebla ĉe Ente Provinciale per il Turismo (Piazza Cacciatori delle Alpi, Como, Italujo.)

★ **NÜRNBERG**, 24-paĝa (20 x 21 cm.) prospekto konsistanta el 19 belegaj ilustraĵoj kun teksto en 7 nacilingvoj, 4-paĝa artikolo kaj 2 landkarto. Kiuj intencas viziti Nürnbergon, povas ricevi ĝin de Verkehrsverein Nürnberg e.V. (Lorenzerstr. 31, Nürnberg, Germanujo).

★ **PADOVA KAJ ĜIA FOIRO**, 8-paĝa ilustrita broŝureto kun la klariga teksto en esp. pri la resuma historio kaj vidaĵoj de Padova kaj pri ĝia foiro. Havebla ĉe Fiera Internazionale di Padova, Italujo.

OOMOTO estas abonebla

ĉe la INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO

Riouwstraat 172 DEN HAAG, Nederlando (Poŝtkonto 408826)

Abonkotizo: 18 Steloj por 1 jaro

*

Hispanaj samideanoj povas aboni

ĉe nia Reprezentanto:

**S-ro J. Juan Forné,
Marti 3. VALENCIA.**

(1 Stelo egalas 2.50 pes.)

Parolas la Legantaro

★ S-ro *M. C. Butler*, London, Anglujo
 Gratulon pri la lastaj numeroj de OOMOTO — mi ĝojas vidi la indekson, kiu multe helpas studi la enhavon. La artikoloj en OOMOTO estas ĉiam tre interesaj kaj bonstilaj kaj lingve bonegaj.
 Nur unu kritiketo. Sendube Izraelo nomas la landon, ne Izraelujo. Kaj loĝantoj estas *Izraelanoj*.

Mi persone tre preferas diri Koreo (lando) kaj koreano (loĝanto) kiel en Angla lingvo, sed mi komprenas kial vi preferas Kore-o, Koreujo. Ĉu devas ĉi tie verki la historieco aŭ la internacieco?

★ D-ro *J. Hamvai*, Auckland, Nov-Zelando

Kun ĝojo mi sciigas vin, ke antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis vian afablan memordonacon, la belegan, artan ventumilon. Bonvolu akcepti pro ĝi miajn plej varmajn dankojn, kune kun mia edzino. Ĝi restos por ni ĉiam bela, ĉarma, vere originala, japana memoraĵo.

Same mi povas vin sciigi pri la alveno de la sept.-okt. numero de la OOMOTO. Mi jam delonge, sopire atendis ĝin, pro ĝia valoro, profunda kaj en perfekta Esperanto skribita enhavo.

★ S-anino *Ĉizuko Haĉija*, Fukuoka, Japanujo

Kun elkora danko mi ricevis la gazeton OOMOTO. Tiu ĉi numero (11-12) estas precipe multsignifa — raporto de la Kongreso de l' mondfederacia afero en Hiroŝima ktp. —

Mi volonte donacis ĝin al mia germana samideano kiu deziras scii pri japana religio. Estas fiere kaj signifoplene, ke en nia lando estas tia, elstara religio, kia sin dediĉas pozitive al

mondopaco kaj ampleksa idealo.

★ S-ro *C. Daglio*, Tortona, Italujo

Antaŭ 4 tagoj mi ricevis vian revuon, n-ro 9-10 de 1952. Grandparte mi legis ĝin kun intereso, eĉ la religian parton, kvankam mi ne okupiĝas pri tiu afero. Via movado, via organo estas atentindaj por ĉiuj legantoj, kia ajn estas ilia opinio pri la temoj pritraktataj. La lingvaĵo estas bona, tiel ke el la nura lingva flanko via revuo estas vere utila legaĵo. Mi deziras ke via agado daŭru kaj pliampleksiĝu.

★ S-ro *H. Dabrowski*, p. Wolanow, Polujo

Post longa atendo alvenis n-ro 9-10/1952 de ŝatata, altnivela OOMOTO. Mi elkore dankas al vi kaj malpacience atendas sekvontajn numerojn, kiuj pli bone helpas al mi kompreni vian afereman, noblan laboron por humana ideo, por amikeco inter nacioj kaj paco tutmonda. Almenaŭ per pensoj mi estas ĉiam kun vi, ĉar rekte mi ne povas helpi al vi pro tiuj ĉi malbenitaj limbaroj, kiuj dividas nin. Tamen nia nobla ideo de homamo kaj paco estas kapabla trapanetri limojn kaj unuigi gehomojn de bona volo sur tiu ĉi pekema mondo! Ĉiam mi estas kun vi, ĉar sur via flanko estas paco, vero kaj justa homamo. Tial via (nia) ideo venkos, kaj malgraŭ malfaciloj renkontotaj sur la vojo ni kune atingos la celon!

★ S-ro *E. Tomczyk*, Myseowice, Polujo

Kun sincera danko mi konfirmas la ricevon de via tre ŝatata gazeto. Ĝi estas la unu-nura kaj tre bone redaktita organo laŭ stilo kaj enhavo. Viaj lastaj artikoloj pri la teruraj efikoj de atombomboj faras terurajn impresojn ĉe mi kaj miaj

geamikoj al kiuj mi pruntedonis la gazeton.

★ S-ro *L. Giloteaux*, Croix, Francujo

Dankon pro la specimenoj de OOMOTO, kiujn vi sendis al mi. Mi tre ofte trovas en via revuo interesajn informojn. Mi uzas ilin por semajna Esperanto-Kroniko, kiu aperas en la Nordfranca ĵurnalo "Nord Eclair".

★ S-ro *Adolf Stanura*, Ostrava-Radvanice, Ĉeĥoslovakujo

Mi legas vian revuon ĉiam kun tre granda intereso kaj atento kaj mi kredas, ke via vojo al paco, kiu serĉas profundon de homa estaĵo, estas sukcesa.

Ankaŭ mi devas danki nur al nia kara lingvo Esperanto, ke mi povis konatiĝi pri viaj ideoj kaj celado. Ankaŭ estas tre dezirinde, ke Esperanto restu ĉiam ligita kun tiaj ideoj, kiuj kunproksimigas la homaron kaj ne dividas ĝin.

★ S-ro *Bozic Janko*, Gablern, Aŭstrujo

Tuj kiam mi la unuan ekzemplon de via gazeto tralegis, mi decidis skribi al vi. Ĝi tre plaĉas al mi pro la bonaj artikoloj. Ĝuste en la hodiaŭa tempo ni treege bezonas tiamanieran gazeton. Estus bele se ĝi ankoraŭ pligrandiĝos. Ni ja ĉiuj eŭropanoj tre malmulte scias pri tiu tiel malproksima lando, kie restas ankoraŭ belaj malnovaj kutimoj kaj specializaĵoj troveblaj nenie alie.

★ S-ro *B. C. Hessels*, Amsterdam-Z., Nederlando

Ĉi kune mi iru decide al la celo por plenumi malnovan planon, t.e. danki vin tutkore pro la fakto, ke via forta kaj konvinkita movado kompleksas regule havigi al mi la tre legindan organon de Oomoto.

Efektive, pensante pri la proverbo, ke la infero estas pavimita per bonaj intencoj, mi kaptis la bovon ĉe la kornoj,

prenis paperon kaj skribis.

Seninterrompa okupeco pri laboro rilate nian universalan lingvon estas la kaŭzo, ke mi ofte ne scias el kiu fonto ĉerpi la temon por aliaj aferoj.

Sed al la afero. Okaze de via jubileo mi sincere gratulas vian nelacigeblan spiritan movadon.

Mi alte taksas la regulan sendon de OOMOTO, ĝia stilo estas vere universa, la legado tre lerniga.

Via organo estas bonega propagandilo por la eksterstarantoj, mi ĉiam utiligas la okazon atentigi la homaron pri nia paciga kaj komuna afero.

Ho, kiom mi sopiras al la efektivigo de unu el miaj sonĝoj, nome admiri vian landon de la leviganta suno, kaj tie apliki la de ni propagandatan lingvon. Sed restu loko en mia cerbo por revoj.

Cetere mi deziras al vi ĉiuj multan progreson, laboremon kaj sukceson kun la arda espero, ke ni kune atingu la celon, nome savi la homaron.

Por nia Botanika Ĝardeno

Ni danke kvitancas jene:

26. S-ro H. Groendijk, Arnhem, Nederlando: semoj de 3-specaj sanigaj plantoj
27. F-ino Siri Linnander, Stockholm, Svedujo: semoj de 3-specaj floroj
28. S-ro Jorge Sant' Ana, Juiz de Fora, Brazilo: semoj de karoto
29. S-ro Albert Banska, Eibelsstadt/M., Germanujo: semoj de Lilium Martagon
30. S-ro Ivica Šponar, Zagreb, Jugoslavujo: semoj de 7-specaj regionaj plantoj

El Notlibro Esperantista

Torus Mikami

Legante N-ron 13 de Heroldo de Esperanto (16, sept., 1953) mi renkontis hazarde du vortojn, kiuj ŝajnas esti balasto por la lingvo. Ili estas "bilingvismo" kaj "dom-asista." La unua^① devus esti *dulingvismo* kaj la dua, *dom-serva*. Ĉi tiuj kaj aliaj simile fremdaj vortoj estas tiel facilanime enkondukitaj, ke mi dubas, ĉu oni intencas fari *lingua franca* el Esperanto. Tiele, Esperanto *bekamas more kaj more difikulta*. Ĉu Esperanto aŭ *Espangla*? Se oni ne komprenis, mi ripetu: Esperanto fariĝis *majore dificila*! ②

"Scenaro" — jen estas alia ekzemplo. Ĝin trovis mia amiko en iu pasinta numero de LA MOVADO, kaj demandis ĉu ĝi estis uzinda. Mi tute malkaŝe esprimis mian opinion, ke ĝi estas malrekomendinda pro la kaŭzoj: 1) Kun tia senskrupulo, per kiu iuj uzas la vorton *scenaro*, aliaj egalrajte povus uzi, ekzemple, *vokabulario* kaj *dicionario* anstataŭ "vortaro," kaj tia tendenco certe kondukos nin al vortara anarkio, kaj 2) Ni povas senigi la vorton "scenaro" per vortoj el nia provizo jam ekzistanta: *kinorakonto*, *radiodramo*, *scenlibro*, *scenoteksto*, *dialogoteksto* ktp. laŭ la bezono de okazoj. (Legu la 2-an paragrafon de l' piednoto 8.)

La frivola kaj nesufiĉe pripensita enkonduko de fremdaj vortoj estas danĝera, ĉar ĝi eventuale degenerigus unu aŭ alian kvaliton, aŭ ambaŭ kvalitojn de nia lingvo — vort-kunmetado kaj -derivado. Ĉi tio tute ne estas la nova temo. Ĉi tio estis la problemo de hieraŭ; ĝi estas la problemo de hodiaŭ kaj ĝi estos la problemo de morgaŭ. Tamen la averto pri la danĝero ne estu profeta. Ni do lernu ĉi tie el la evoluhistorio pri la angla lingvo, kion ĝi gajnis kaj kion ĝi perdis. Por tiu celo mi ĉi-sube elangligas kelkajn paragrafojn el THE MAKING OF ENGLISH de Henry Bradley^③. Ni legu ilin ĉiam memorante, ke *nia* lingvo estas la helplingvo internacia, esence kaj universale inter-homa, kaj nia lingva celo ne estas elfari ian mikslingvon, kiu konkuras en ĉiuj rilatoj kun iu aŭ alia

eŭropa nacilingvo.

Oni ofte insistas ke la enfluo de fremdaj vortoj en Anglan malfortigis, anstataŭ plifortigi, la lingvon, kaj ke estus bone se, anstataŭ preni vortojn de Franca kaj Latina, niaj samlandanoj estus satigintaj, same kiel la germanoj, la bezonon je novaj vortoj per formado de kunmetaĵoj kaj derivaĵoj el la vortoj apartenantaj al la hejma provizo. La advokatoj de tiu ĉi opinio havas kelkajn faktojn ĉe sia flanko. Estas vera difekto en Angla, ke tiaj vortoj, kiaj *mind* kaj *mental*, *eye* kaj *ocular*, *sun* kaj *solar*, *moon* kaj *lunar*, *bone* kaj *ossify*, ne havas forman parencecon korespondan al ilia parenceco en signifo, kaj ni vidos en sekvanta ĉapitro (Vidu la sekvantan paragrafon — Noto de T. Mikami) ke nia lingvo suferis iom da vundiĝo pro parta perdo je ĝia kapablo formi kunmetitajn vortojn. Laŭtute, tamen, la efiko de la etimologia diverseco de la vortaro provizis la lingvon per senkompara abundo de proksimumaj sinonimoj, kiuj esprimas subtilajn nuancojn malsamajn en signifo kaj nuanco de sento. La distingo inter paroj da vortoj, kiaj *paternal* kaj *fatherly*, *fraternity* kaj *brotherhood*, *celestial* kaj *heavenly*, *fortune* kaj *luck*, *felicity* kaj *happiness*, *royal* kaj *kingly*, estas tre realaj al anglo, kiu konas sian propran lingvon, sed estas ne facile tradukeblaj en fremdan lingvon.

La kutimo libere adopti fremdajn vortojn, kiu naskiĝis el la kondiĉoj, sub kiuj la Angla lingvo evoluis, havis la bonan rezulton, ke ĝi senigis al ni la neceson nin turni al vortkomponado en tiaj okazoj, en kiuj kunmetita vorto mem estas malpli konvena por nia celo ol unuopa vorto. Sed aliflanke, nia lingvo perdis iom de sia kapablo formi kunmetaĵojn, eĉ kie ĉi tiuj estus utilaj.

Kvankam la bilanco ŝajnas montri, ke la profito kaj malprofito estas 50-50, tamen ni legu ankoraŭ la jenan paragrafon.

Certe multaj tiaj kunmetaĵoj, kiuj iam antaŭe estis uzataj, nun forestas el ĝenerala uzo. La tradukintoj de nia Biblio povis skribi "My downsitting and mine uprising^④"; sed en la natura moderna angla lingvo la ekvivalenta esprimo estus 'my sitting down and my rising up^⑤'. Antaŭ ne longe, tre kapabla eksterlanda klerulo, skribinte gramatikan traktaton angle, embarasis siajn legantojn per uzo de la vorto *down-toners* kiel la nomo por kategorio de adverboj kiuj (kiel *rather*, *somewhat*^⑥) 'tone down^⑦' la forton de la vortoj al kiuj ili estas antaŭmetitaj. Sendube, se la frazo 'to tone down' ekzistis en la dekseka jarcento, verkanto de tiu periodo estus povinta paroli per 'down-toner' sen ia risko esti nekomprenata. Sed ĉi-rilate la lingvo trairis ŝanĝon, kiu eble estas ŝanĝo je pli-malboniĝo, sed kiun rezisti estus vana provo^⑧.

*

La okcidentaj samideanoj eble miros, se mi malkaŝas, ke eĉ

la uzo de *jes* kaj *ne* en Esp. estas praktike malfacila al multaj japanaj esp-istoj. Inter la memnomaj "komencantoj" (inter kiuj estas 20- aŭ 30-jaraj laŭ sia esp-ista aĝo!) sin trovas ne malmultaj, kiuj konstante misuzas *jes* kaj *ne*. Verdire, la esp-a uzmaniero, tiel komuna en eŭropaj lingvoj, ne estas en si mem malfacila, sed la japanlingva kutimo en la uzo de *jes* kaj *ne* estas ne entute sama kun la esp-a. La japana "*ne*" en certaj okazoj signifas "*jes*." Se vi dirus al japano, "Mi petas vian afablan pardonon!" li — se li estas ankoraŭ ne alkutimiĝinta al la eŭropa maniero — ĝentile ridetante pardonos vin per tuja respondo, "Ne, tute ne, sinjoro!" Li signifas: *Ne*, la afero *tute ne* gravas; vi do *tute ne* bezonas pardonpeti!"

Alia ekzemplo. — Al via demando, "Ĉu vi *ne* estas malsata?" li respondos per "*Jes*" kiam li *ne* estas malsata, ĉar laŭ sia kutimo en la gepatra lingvo li *jesas* vian supozon: *Jes*, (via demando estas ĝusta, ke) mi *ne* estas malsata.

La kompara studo — aŭ almenaŭ ioma prikonsidero — pri tiaj "kontraŭoj" de pensmaniero estas ne nur interesa, sed nepre necesa por Homaranoj⁹ kaj speciale por gardi Esperanton kontraŭ danĝera vojo.

De tia "kontraŭo" mi trovis tre interesajn ekzemplojn en "God's Word in Human Language¹⁰." Mi esp-igas ilin ĉi sube.

En fremdaj kulturoj troviĝas ĉiam multaj fazoj, kiuj ŝajnas tute kontraŭecaj. Kiam ni ekscias, ke en la Quechua-dialekto de Bolivio, oni devas paroli pri la pasinteco kvazaŭ kuŝanta antaŭ si kaj pri la estonteco kvazaŭ kuŝanta malantaŭ si, ni inkliniĝus akuzi la Quechua-anojn ke ili estas stultaj, aŭ ke ili havas renversitan filozofian orientadon. Tamen, la Quechua-anoj povas plene defendi sin kaj siajn idiotismojn. Ili argumentas, "Bone, se vi volas, imagu al vi la estontecon kaj la estontecon. Kiun vi povas vidi?" La sola respondo, kiu estas ebla por ni, estas ke ni povas vidi la pasintecon kaj ne la estontecon. "Ĝuste," ili konsentas, "tial la pasinteco devas esti antaŭ vi kaj la estonteco malantaŭ vi." Nia interpreto pri la pasinteco kaj estonteco estas bazita sur movado; ilia baziĝas sur perspektivo. La unua estas same valida kiel la alia.

La enketvojaĝo en la animon de lingvo ofte estas embarasa, ĉar niaj idiotismoj, kiuj estas la signiloj de nia penso, ŝajnas ne havi siajn parulojn, aŭ ne havi almenaŭ pretajn ekvivalentojn. Efektive, ofte la komparo aperas kontraŭa. Por ekzemplo, la maldike longaj Shilluk-indiĝenoj de la Anglo-Egipta Sudano parolas pri avarulo kvazaŭ "havanta grandan koron"

kaj pri malavarulo kvazaŭ "havanta malgrandan koron." Tio ĉi ŝajnas al ni ridinda, sed ne al Shilluk-indiĝenoj, kiuj estas senmanke preparitaj defendi sian idiotismon, kiel ni la nian. Ili argumentas, ke avara, egoisma homo estas tiu, kiu forprenis al si ĉion, kion li povas, kaj konservis ĝin en sian koron. Konsekvence lia koro estas vasta. Tamen, la malavara homo estas tiu, kiu fordonis ĉion efektive, kion li posedis, kaj pro tio lia koro estas malgranda. Tio ĉi estas plene prava kaj same adekvata kiel nia koresponda idiotismo.

⁹ Oni ne estu tro provokema citante la vorton "biciklo," ĉar subfosi LA FUNDAMENTON ni jam ne bezonas.

¹⁰ Mi mem rekonas, ke mi troigas la aferon, sed la problemo ne estas pro tio malpli grava.

¹¹ Japanaj interesitoj povas legi la japanlingvan tradukon: 「英語の成立」 eldonita de 泰文堂 Tokio. Prezo ¥300 (Nepetita reklamo).

¹² El Psalmo 139, 2: "Thou knowest my down-sitting and mine up-rising." — "Vi scias, kiam mi sidas kaj kiam mi leviĝas." (Zamenhova traduko)

¹³ "Thou knowest when I sit down and when I rise up." (Revised Standard Version). Cetere, estas rimarkinde, ke ĉi tiu moderna traduko estas multe simila al la esp-a.

¹⁴ rather, somewhat = iom (Fulcher-Long)

¹⁵ moderigas (Fulcher-Long)

¹⁶ "Lingvoj havas sian junecon, maturecon kaj maljunan aĝon — kaj eble sian renesancon. Trench, antaŭ preskaŭ 100 jaroj, advokatis la reuzon de multaj malnovaj vortoj, plenaj de esprimiveco, por injekti novan forton en la anglan lingvon. *Dearworth* (altvalora); *bodeword* (malpermeso); *songsmyth* (poeto); *eyebite* (ĉarmo); *turngidy* (vertigo); *gripful* (avara) ... La senpreteco de l' angla por readopti ilin estus signo ke ĝi estas en maljuna aĝo." — Esp-igo mia el la frontartikolo de LA RONDO, aprilo, 1950.

Estas treege stranga kaj interesa fenomeno, ke dum ni esp-istoj evitemas kunmetaĵojn, usonanoj kunmetemas uzante sian lingvon. Jen: *radiator* (radio-oratoro, t. e. radikomentisto); *musicomedy* (muzik-komedio); *cinemusical* (kinomuzika); *cinemactor* (kino-aktoro); *cinemansion* (kinoteatrejo); *cinemaestro* (reĝisormajstro); *tunesmyth* (arifarĝisto, t. e. komponisto de popularkantoj); *science-fictioner* (sciencfikciisto). — La ekzemploj de ĉi tiu angla modernema kunmetado fare de usonaj ĵurnalistoj estas el la artikolo, "Pri la Stilo de TIME-gazeto" de s-ro Hideo Nakaniŝi, aperinta en 「英語青年」 ("The Rising Generation," dec., 1953).

¹⁷ Mi ofte pensas, ke Esp. havus pli da bonkvalitoj, ol la nunaj, nur se D-ro Zamenhof iam estus lerninta la japanan... aŭ iun ajn ĉefan lingvon de Azio.

¹⁸ Legu "Notlibron" en la pasinta numero.

Indekso pri OOMOTO 1953

<i>De Onisabro Deguĉi</i>	Pensoj en Soleco	76
Amo al Dio	Hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ	85
Fundamento de Animo	Deziro al Reformo de UNO	100
Homo kiun oni amas	Japanujo kaj Svisujo	106
Vortoj de Majstro O. Deguĉi	Du vilaĝoj nove proklamis	
Sufero kaj Komforto	sin "Mond-Vilaĝo"	109
La Universo kaj la Elektriismo	Alvoko al la tutmondaj Infanoj,	
<i>De Naohi Deguĉi</i>	Gepatroj kaj Edukistoj ...	122
Mume-floro ekfloras	Universala Kongreso en Jugoslavujo	124
<i>De Hidemaru Deguĉi</i>	Atomfiziko kaj Heredscienco	133
Filozofio de l' vivo	Kreskanteco de l' Ĉiomo (1)	138
Memornoto	La 40-a Japana Esp-Kongreso	140
Suferi kun Ĝojo	Kelkaj Komentoj el UHA-jurnalo	148
<i>OOMOTO kaj U. H. A.</i>	<i>Foto-paĝoj</i>	
"Macuri" — Harmoniigo-Diservo	Festo por la Memoro de la	
Saluto de S-ro I. Deguĉi	Konstruiĝo de Mirokuden-Preĝejo	48
al mondfederalistoj	Kamejama Botanika Ĝardeno	80
Statuto de U. H. A.	Arto de S-ino Naohi Deguĉi	110
Ŝton-monumento pri Oomoto-doktrino	<i>Poemoj</i>	
Poem-monumento de Dua	Adoro	53
Majstrino Sumiko Deguĉi	Al la Majstro O. Deguĉi	121
Pri Kamejama Botanika Ĝardeno	Tri Amatinoj	145
Artoj kaj personeco de	La Destino	145
Bofratino Naohi Deguĉi	<i>Literaturaĵoj</i>	
Pri Kameoka Infanejo	La Faden de Araneo	26
<i>Diversaĵoj</i>	Unu Viro kaj Majstro O. Deguĉi	59
La Origino kaj Progreso de Tao-Juan	Tridek Minutoj inter Telegramoj	90, 125
Nova Triumfo de UNESKO-Rezolucio	<i>Serioj</i>	
La Homaro kaj la Mondbildo	Mondobservado	20, 50, 82, 114
Mia impresoj en Japanujo	Parolas la Legantaro	22, 54, 89, 154
Tri direktoj de fonetikaj studoj en Esp	Literatura Rubriko	24, 56, 86, 117, 151
Kontribuo al la Paca problemoj	El Notlibro Esperantista	29, 120, 156

Redakcia Postskribo

Ni eldonas tiun ĉi numeron en la formato kvar-monata, septembro-Decembro, kaj devas fini la jaron 1953. Dum la jaro ni klopodis kiel eble plej reguligi la aferon de nia gazeto, sed malgraŭ ĉiuj niaj klopodoj la cirkonstancoj ne permesis tion. La malfruigo, kaŭzita unue de la malsaniĝo de la redaktoro, restis nehelvebla pro la ĉiam kreskanta re-eldono de la verkaĵoj de Majstro O. Deguĉi, la eldono de l' alia Oomoto-literaturo, inklude kelkajn japanlingvaj gazetojn, kiuj kune preŝkaŭ foruzis la tutan kapablon de nia Presejo en Kioto.